

V-19582/29.1957

Dansk



ESPERANTO-BLAD

UDGIVET AF
ESPERANTIST-
FORENINGEN
FOR
DANMARK

★

ELDONATA DE
CENTRA DANA
ESPERANTISTA
LIGO

★

29. ARG.
SEPT.-OKT.
NUMMER

10-11



La vikingo de la dana Esperanto-movado.

Plurfoje f-ino Noll festis eĉ tre rondajn naskiĝtagojn kaj jubileojn kiel esperantistino. En oktobro ni denove rajtas gratuli, ĉiufoje pri 50-jara esperantista jubileo. Daŭre energia, daŭre partoprenanto en Esperanto-okazaĵoj, — tiel ni konas la prapatrinon de nia nacia Esp.-movado. La foto datiĝas de junio, kiam ŝi partoprenis en ekskurso de KEK al la vikingaj festludoj en Frederikssund.

DANSK ESPERANTO-BLAD

udkommer den 15. i hver måned.

Stof må være redaktøren i hænde senest den 25. i den foregående måned.

Redaktør: Ole Nederland,
Primulavej 6r, III, Odense.

Ekspedition: C. Graversen,
Borgergade 48, Esbjerg.
Postkonto 57274.

Abonnement: 8 kr. pr. år.
Eksterlanda jarabono: 6 d. kr. aŭ 10 re-
spondkuponoj.

Afergvidantaĵoj

De s-ro Victor Rude, Kopenhago, ni ricevis 15 kr. por Subtenanto-kotizo por 1957. — Koran dankon.

La tuta enpagita sumo por 1957 estas nun 825 kr.

*

Centra har en enseelig bunke af turistbrochurer, skrevet på Esperanto. Ved henvendelse til undertegnede kan De få et antal eksemplarer gratis til uddeling, — men vedlæg venligst svarporto!

*

Desværre har den bogtrykker, der hidtil har fremstillet de kontingentmærker, der anvendes af Centra, ikke overholdt en aftale om fortsatte leverancer af mærkerne, hvorfor vi må finde en anden bogtrykker. Mærkerne kan derfor først ventes omkring 1. november.

*

— — og plakaterne „Lær Esperanto — det andet sprog for alle“ samt „Esperanto — det internationale sprog“ — og folderne „Verden bliver mindre og mindre“ fås stadig hos

Forretningsføreren for CDEL,

L. E. Kromann Jensen,

Algade 11 - Nykøbing Sjælland

Postkonto 57370.



D. E. F.
meddeler:

at vor karavanefest i København blev afholdt 20/9 i Sct. Andreas-ordenen. Rejsefilmen fra i sommer „Alpetoppe og franske slotte“ blev vist og høstede stort bifald. Den varer ca. halvanden time. Bagefter var der fælles kaffebord og dans. Der deltog 65. Fin stemning. Karavanefesten i Vejle afholdes den 12. oktober.

at farmaceut fru Lili Pozenel fra Lubljana og skoleinspektør F. Föringer fra Salzburg kommer til Danmark og i henholdsvis november og februar foretager en foredragsrejse med lysbilleder rundt i landet. Er De interesseret, skriv da til undertegnede. Begge arrangementer er billige.

at vort nye bogkatalog blev udsendt i begyndelsen af september. Hvert katalog er forsynet med nummer. Lodtrækning om et gratis kursusophold på Den internationale Højskole i Helsingør vil finde sted 25/5 1958 og foretages af formanden for Eksamenskommissionen. Resultatet bekendtgøres her i bladet og i Nia Voĉo. Ejeren af det udtrukne nummer må melde sig inden kursus-ugens begyndelse. — Har De ikke fået kataloget, kan De skrive efter det.

at også Deres forening kan få farvefilmen „Alpetoppe og franske slotte“ at se, hvis De ønsker det. Den ledsagende forklaring gives pr. Esp. eller på dansk efter ønske.

DANSK ESPERANTO-FORLAG

Ingemannsvej 9 - AABYHØJ

Kongresante en la somero 1957

Somero estas bela sezono. Banalaĵo — sed permesu ĝemeton en pluva aŭtuna tago; kaj kion farus vere ni esperantistoj sen somero kun ĝiaj abundaj eblecoj por rilatigi niajn vintrajn studadojn, la kiu-kio-kie-kiam-ktp.-flankon de esperantismo, al realaĵoj. Ĉiusomere okazas vera amaso da esperantistaj kunvenoj. Multaj ege interesaj kaj priskribindaj. En la sekvonta ciklo ni devis limigi nin al priskribo de tri el ili. La formo de la priskriboj estas malsama, sed videbla en la teksaĵo de ĉiuj ekzistas ruĝa fadeno de entuziasmo pri la fenomeno Esperanto.

*

D-ro *Tomo Miletic* pruntis al ni folion el sia taglibro pri la 42-a U. K.:

Nia alveno al Marsejlo.

Nia alveno al Marsejlo! Erling direktis la aŭtomobilon tre sendanĝere tra la plenplenaj marsejlaj stratoj kaj avenuoj. Estis preskaŭ la kvara horo, kaj ni urĝis al la kunvenejo, ĉar Erling kaj Svend devis ĉeesti la komitatan kunsidon je la kvara. Ni pretervojaĝis la imponan konstruaĵon de la stacidomo, kaj tuj post tio ni ekvidis la karan verdan flagon, blovatan de la vento. Ju pli ni alproksimiĝis al la kongresejo, des pli kreskis en ni speciala sento, sento promesanta al ni belajn, etajn amikecajn momentojn kun niaj amikoj el diversaj landoj, sed ankaŭ travivon, grandan travivon de monolita unueco kaj forto de nia movado. Por mi, ĉiam, la kuna solena kantado de nia himno, estas la plej elstara punkto de la kongresoj. Neniam mi forgesos la kongreson en Zagreb, kiam mi antaŭ kvin jaroj, unuafoje staris inter kongresanaro, kaj impresigema de pli ol mil voĉoj mi ne povis

kanti, ĉar mia gorgpomo tremis, kaj voĉkordoj ne donadis eĉ unu sonon.

— Kaj jen, mi estas ĉi tie, denove.

La unuaj renkontiĝoj, manpremoj, kaj kisoj! Ĉijare mi ankaŭ atendis kun granda ĝojo revidon kun *Anĝelka* kaj kelkaj aliaj membroj de nia Esperanto-societo en Zagreb, kiujn mi ne vidis depost la kopenhaga kongreso. Vere estis travivaĵo aŭskulti iliajn voĉojn, sunplenan ridon de *Anĝelka*, kaj denove aŭdi la profundan baritonon de *Joso Ŝlat*. Ho miaj karaj klubanoj, kiel ofte mi pensas pri vi, kiel ofte mi estas kun vi en niaj klubejoj!

— Post la ricevo de niaj kongresaj dokumentoj kaj insigno, kaj kiam la unuaj momentoj de interbabilado forpasis kaj ni trankviligis nian trinkemon per la bona franca vino, ni disiĝis. Ni devis prepari nin por la interkona vespero.

*

Sed ankaŭ pli proksime oni povas sperti la konatan esperantistan atmosferon. Jen ekzemple de s-ino *Eja Nielsen*, Vejle, kelkaj impresoj

por ĉiuj kiuj ne konas la somerajn kursojn en Elsinoro.

Estis belega dimanĉo kiam la kursoj komenciĝis. — Iom post iom venis 90 gesamideanoj el 10 landoj, i. a. juna japano.

Ida fumegis kaj inspiriĝis kaj inspirigis pro tio, kaj *Nollo* neniam fumas kaj inspiriĝis pro tio, forlasis nin kaj vojaĝis al Marseille. S-ro *Morariu* kaj s-ino *Zacho* laboris kaj kuraĝigis multajn novajn esperantistojn, ĉiu per sia propra maniero. S-ro *Søgaard* fariĝis ŝatata instruisto por la tre junaj gesamideanoj, ne nur ĉar li sukcesis instrui al ili multajn vortojn, sed ankaŭ

ĉar li komprenis la valoron de sufiĉe longaj paŭzoj.

Kiel ordinare la gvidanto, kiun ni ĉiuj konas, bone organizis la tutan aferon, kaj li eltrovis por ni kelkajn belajn surprizojn.

Iun vesperon profesoro en muziko — el Parizo li estis — venis. Eĉ por ni kiuj konas la diferencon inter Schubert kaj Chopin nur pere de la diversaj silabmanieroj de la komponistnomoj, lia pianludo fariĝis io neforgesebla. Ŝvebis io en la koncertejo, io super la politiko, io super ĉio kio eblas malheligi la vivon.

La preskaŭ sama sento ĝojigis nin alian vesperon, kiam dana samideanino — fino *Trærup* — montris filmon el Jugoslavio kaj bele kantis popolkantojn de tiu lando. Fremdaj sonoj por ni, sed ili rakontis ion pri la animo de tiu popolo, kiu ofte suferis pri milito, malsato ktp.

Neniu kurso en Elsinoro sen ekskurso al Helsingborg!

Kaj Fredensborg kaj Frederiksborg! Jes, se oni estas eksterlandano oni kompreneble

deziras rigardi ankaŭ ilin. Dume ni estis kelkaj danoj kiuj restis hejme, ĝuis la rigardon de la rozoj kaj babiletis kun la kokcinoj. Poste ni iris al la urbo, kies vidindaĵojn afable montris al ni s-ro *Langkilde-Rasmussen* el Elsinoro. — —

— Kompreneble oni povus pli multe rakonti pri la vojaĝfilmoj, la samideaneco ktp.

Ĉu vere tiel idilia la tuta afero, vi demandas. — Estis ferio, kaj kiam okazas vera libertempo oni prenas la kofron kaj malnovan sakon, en la lastan oni metas ĉiujn ĉagrenojn, lasas ilin tie kaj eltrovas, kiam oni venas hejmen, ke la malbela enhavo malpligrandiĝis.

Ĉu aliaj rezultoj? Jes, ekz. kiam mia rojara knabineto kaj mi estis iom malsamopiniaj, ŝi impertinente kaj fiere metis la nazon en la aeron kaj grave diris: „Kiam mi estos plenaĝa mi vojaĝos al Elsinoro kaj restos tie ĉiam; tie la homoj estas afablaj — nome!“

★ ★ ★

Internacia esperantista kunveno en Moskvo

Antaŭ malmultaj jaroj Esperanto kaj Sovet-unio estis vortoj malofte kunigataj, kaj kvankam Rusujo estas la lando, kie nia lingvo unue trovis adeptojn, oni ankoraŭ ne ĝenerale kredas, ke la nombro de rusaj esperantistoj estas konsiderinda. Tamen ĉi-jare okazis en la kadro de la 6-a Junulara Festivalo internacia esperantista kunveno en Moskvo.

El Danlando partoprenis 4, unu el ili estis s-ro *G. Kühlmann*, multjara membro de la ĉefestraro de CDEL.

Ni kaptis la okazon por rapida intervjuo kaj demandas:

Antaŭ kiom da jaroj okazis la lasta internacia Esp.-kunveno en Sovet-unio antaŭ la ĉi-jara?

Laŭ mia scio la lasta esperantista kunveno — estas la VI-a Internacia Proletaria Esperanto-Kongreso (SAT) en Leningrado 1926, partoprenis tiam proks. 400 personoj el 14 landoj. Oni okaze de tiu kongreso eĉ eldonis du diversajn poŝtmarkojn je valoro de 7 kaj 14 kopekoj. Post tiu kongreso la atmosfero pri Esperanto en Sovet-unio iomete malboniĝis. Tute malpermesita Esperanto ne estis, sed diversaj dekretoj kaŭzis, ke la movado ne povis ekzisti kiel memstara organizo. Tiuj dekretoj ne nur trafis la Esperanto-movadon, sed ankaŭ multajn aliajn movadojn, idealismajn kaj internaciajn.

Kio estis la celo de la ĉijara kunveno?

Kolekti la esperantistajn partoprenantojn

de la Festivalo, kaj por ili okazigi apartajn aranĝojn. Bedaŭrinde ĝi estis lokigita en la lastajn tagojn de la Festivalo, kaj pro tio la esperantistoj ne havis okazon kontaktiĝi en pli frua stadio de la Festivalo. Sed ĉe la unua kunveno efektive ĉeestis proks. 250 personoj el 25 landoj, inter alie (Brazilo, Ĉinio, Japanujo, Hungarujo, Vietnamo, Svedujo, Danlando (4), Norvegujo, Francujo, Germanujo kaj Bulgarujo.

Kaj pri kio vi okupis vin?

La temo de la kunveno estis: „Rolo de Esperanto en proksimigo de popoloj kaj en lukto por paco.“ Unue oni bonvenigis la ĉeestantojn, kaj la reprezentantoj alportis salutojn de siaj respektivaj landoj. Post prezento de la temo okazis diskuto. Estis aranĝita ekspozicio de Esperanta literaturo, kiun ni rigardis, kaj la tago finiĝis per danco.

La sekvantan tagon oni denove kolektiĝis kaj la diskutoj daŭriĝis. Okazis disdono de donacoj de la Moskvaj samideanoj al la eksterlandaj gastoj. Prezento de son-filmoj esperantlingvaj, kaj skeĉoj en Esperanto. La aranĝo finiĝis per libera kunestado.

Kio impresis vin speciale en Sovet-unio?

La sincereco de la homoj en la stratoj — tute malfermaj kaj gajaj ili interfratiĝis kun la festivalanoj. Helpemaj kaj bonkoraj la Moskvo-anoj estis, kun granda espero pri la estonteco, kaj kredo pri paca kaj trankvila evoluo de la progresoj en sia lando. Kaj en Moskvo oni ne povis ne admiri la Metron (subtera fervojo), tiu giganta kreaĵo kun la multaj belegaj stacioj, ĉiu por si mem artaĵo, pura kaj bela — nenia fumo — nenia papero aŭ koto. Same en la stratoj, tramoj kaj aŭtobusoj. Nenia papero aŭ stratkoto.

Kia estas fakte la stato de esperantismo en Sovet-unio?

Ke ĝi momente havas bonajn kondiĉojn, kaj ke granda intereso por la lingvo ekestas. Ekzemple mi povas informi, ke tuj antaŭ la festivalo aperis per eldonejo en Leningrado 48-paĝa Esperanto-lernolibro en eldonon-nombro de 95.000, kaj ĉiuj ekzempleroj estas jam forvenditaj.

La kutima demando pri la festivalo entute: Kiom da propagando ĝi estis kaj kiom da efektiva idealismo?

Efektive mi absolute ne konstatis propagandon flanke de la oficialaj instancoj, kaj por ni konstateble estas, ke la plej multaj partoprenantoj lasis sin gvidi de la idealisma flanko de la festivalo, memoru, ke temis pri amaso da gejunuloj (30.000 partoprenis) kun arda entuziasmo pri libero kaj paco.

Kaj fine: Ĉu la ĉiam ŝanĝiĝaj ŝtatkondiĉoj en Sovet-unio denove endanĝerigos Esperanton en la lando?

Pri tio mi absolute ne povas profeti. Neniu konas la estontecon, sed estas mia konvinko, ke se la mondo travivos trankvilan periodon dum kelkaj jaroj, tiam la movado havos bonajn kondiĉojn en Sovet-unio. La plej multaj esperantistoj en la lando estas gejunuloj, kaj se ili daŭrigos kun sama entuziasmo, kiun mi konstatis dum la festivalo, la batalon por disvastigi la lingvon, tiam la afero estas en bonaj manoj.

INTERNACIA ESPERANTO-MUZEO EN WIEN petas denove atentigon pri la starigota Zamenhof-monumento (DEB n-ro 6—7). Kontribuoj por realigo estu sendataj al la dana reprezentanto, P. Bo Larsen, Øster Allé 51, Viby J.

La fulmtrajno

*

MALNOVAJN JARKOLEKTOJN DE DANSK ESPERANTO-BLAD el la jarkolektoj 1936—46 CDEL proponas al vi. Estas tute senpage, vi nur devas pagi la transportkostojn. La kaŭzo de la propono estas, ke CDEL havas tre grandajn stokojn de la koncernaj numeroj.

Se la afero havas vian intereson, bonvolu en la daŭro de unu monato turni vin al la prezidanto de CDEL, Svend Dragsted, Vejlemosevej 60, Holte.

*

FILMSTRIOJ DE CDEL estas bona ideo por klubvesperoj. En la antaŭa n-ro de DEB vi legis pri tri strioj. La filmstria servo nun posedas 8, nome, krom la menciitaj, tiujn pri kiuj raportis cirkulero de 1/7 al la kluboj, kaj tute novan, koloran filmstrion pri Svislando.

*

TURISMA FALDPROSPEKTO EL WITTEN, Germanujo, estas akirebla kun esp. lingva aldonajo. Adreso: Städtisches Verkehrsamt, (21 b) Witten-Ruhr, Rathaus Verkehrsverein, Germanujo.

*

LA KURSSEZONO SUR FUENO ŝajnas fariĝi sukceso. En Bogense okazas 2 kur-

soj kun 32 partoprenantoj, en Odense enskribis sin ĉ. 55 por tri kursoj. En Fåborg estas aranĝitaj tri kursoj kun ĉ. 60 lernantoj, en Nyborg 2 kun 32; krome okazas kursoj en Nakkebølle, Svendborg kaj Assens, en la du lastaj urboj kun 15 kaj 12. Do entute pli ol 200 fuenanoj lernas Esperanton.

*

LA PLEJ ESPERANTISMA LANDO estis artikolo de „D“ en DEB n-ro 6—7. Angla leganto skribis al ni, ke ĝi memorigis lin pri la diro, ke ekzistas tri specoj de mensogo: Mensogo, granda mensogo kaj statistiko.

*

„LA SUDA STELO“, la bela jugoslava Esp.-aperajo, senpage sendas iun malnovan postmilitan numeron kontraŭ unu respondkupono por kovri sendkostojn. Tiuj kiuj sendos plurajn resp. kuponojn, ricevos nekompletan jarkolekton. Kompletaj postmilitaj jarkolektoj estas vendataj unuavice al bibliotekoj kaj kolektantoj de esperantaĵoj. Al ĉiu interesato oni sendas la dikan kongresnumeron de 38-a U. K. — „La Suda Stelo“ ne plu aperigas organizajn informojn sed fariĝis — kiel ĝi mem skribis — „la suda frato de „Norda Prismo““. Jarabono: 15 steloj; mendu ĝin ĉe „Norda Prismo“, Barnhusgatan 8, Stockholm, Svedujo.

*

ESPERANTISTOJ EN BLUMENAU, BRAZILLO, planas Esp.-ekspozicion kaj petas sendadon de uzitaj poŝtmarkoj, poŝt-

Svend Dragsted: **ESPERANTO** **GRAMMATIK**

*Fås hos klubbernes bogsælgere
eller hos CDEL's Libro-servo*

Heftet: Kr. 4,50
Indbundet: Kr. 6,50
Uundværlig for
danske
esperantister

VESPERA SUSPIRO

de Emil Aarestrup.

*Vespere ruĝetas
glimante la maro;
boat' kun fiŝisto
forĝlitas al faro,
ĝin sorĉe la akvo
ŝpegulas kun bel':
ĉe l' remilo arĝento
kaj or' ĉe la vel'.*

*En laŭbo brakumas
feliĉa fraŭlino
la karan amanton
kun dolĉa inklino.
Ĉe mamu patrino
dormetas knabet',
la vangon ruĝigas
rideta kviet'.*

*Flugadas pepante
hirund' kun hirundo
dancante tra blua
aera profundo;
de ili forfuĝas
zumanta vual'
de kuloj flirtantaj
en gaja spiralo.*

*Krepusko — noktiĝo;
kolombojn mi vidas,
kun kap' sub flugilo
en dorm' ili sidas.
— Mi mem — kial ĝojas
trankvile ne mi
kiel vermo en nukso
kaj kul' sur foli'?*

(trad. C. Graversen)

kartoj, leteroj kaj reklamaj presaĵoj en Esperanto. Adreso: Esperanto-Movado, Blumenau SC, Brazilo.

*

MOGENS LICHTENBERG, la antaŭa turisma estro de Danujo nun estas direktoro en la internacia litvagona kompanio kaj havas planojn pri enkonduko de Esperanto al la konduktoj, kiuj ade spertas lingvajn malfacilaĵojn.

*

F-INO ALFHILD HOVDAN, la energia kaj iniciatema turisma estro de Oslo, eldonigis okaze de la kongreso en Kopenhago belan faldprospekton en Esp., „Bonvenon al Oslo“. Ŝi plene komprenas, ke la helplingvo Esperanto estonte portos pli da turistoj al Norvegujo kaj tial nun denove dissendis belan broŝuron, kies teksto estas verkita de Stöp Bowitz. La broŝuro estas efektive letero pri Oslo, kiun okupataj turistoj povas sendi al siaj geamikoj. F-ino Hovdan krome decidis ke la lasta mallarĝa filmo pri Oslo havu Esp.-tekston.

LA INTERNACIO DE MILITREZISTANTOJ eldonis en Esperanto libreton kun la nomo „La internacia informlibro“; ĝi estas aperaĵo baziĝanta sur speciala numero de la „War Resister“, trimonata eldonaĵo de la ligo. La libreto celas respondi la plej oftajn demandojn faritajn de tiuj kiuj skribas al la centra oficejo por sciigi, kie W. R. I. havas sekciojn, kiuj landoj agnoskas militrifuzantojn, kiuj landoj havas la plej bonajn leĝojn, kie la deviga militservado ne ekzistas ktp. — La libreto eldoniĝis dank' al mondonaco de anonima W. R. I.-ano. Interesatoj povas havigi ĝin per la adreso: La ĝenerala sekretario de W. R. I., 88 Park Avenue, Enfield, Middlesex, Anglujo.

*

Iam kiam mi vojaĝis en Norvegujo, mi vizitis tendaron, rakontas „The Lancet“ en „English Digest“. Poste oni invitis min por tagmanĝi kun la estraro de la tendaro, kaj ĉio funkciis tre bele; ĉiuj staris malantaŭ sia seĝo ĝis kiam la gastigantoj sidigis sin.

LA KLUBA VIVO

Redaktas: S-ino I. Iburg, Sct. Clemens,
Fyn.

København.

La 21-an de aŭgusto ni kolektiĝis ĉe s-ino Marie Nielsen, Randkløveallé 13, Kastrup; scivolemaj pri tio kion travivis niaj samklubanoj en siaj somerferioj. Oni ne seniluziĝis. La granda salono estis plenplena, kiam malfermiĝis la kluzoj.

S-ro Sv. Dragsted partoprenis la 42-an U. K.'on en Marseille, kaj li rakontis pri siaj impresoj de la urbo. I. a. li menciis ke la varmo estis terura, ĝis 38 gradoj, sed tamen la parolantoj estis devigataj porti jakon.

Preskaŭ pli impresa ol la kongreso estis tiu amikeco kaj koreco kiun oni dum la 5—6000 km-a vojaĝo tien kaj reen renkontis ĉe la esperantistoj. Tiam oni profunde komprenis la valoron kaj la forton de la internacia ĉeno esperantista.

F-ino Fried kaj s-ro Henning Olsen rakontis pri la esp.ista kulturdomo Kastelo de Gressillon kie ili pasigis plurajn semajnojn kaj ĉeestis la aranĝojn 14/7—24/7. La kastelo estas sufiĉe agrabla, kvankam ne luksa restadejo. Ĉio spiras pri kvieteco

La ĉefulo sonorigis sian glason kaj diris ion — en norvega lingvo.

Ĉiuj gastoj sidis kapklinante kaj aspektis tre seriozaj. Mi diris „Amen“ laŭte kaj klare — mi trovis ke tio bone konvenas. Sed la gastigantoj ŝajnis surprizitaj.

Mi ne sciis pri kio mi ekparolu al miaj apuduloj kaj demandis angleparolantan norvegon kontraŭe, ĉu ne la gastiganto estis dirinta la kutiman norvegan tablan preĝon. Kiam la ridego ĉesis, mi konceptis, ke tio kion la gastiganto estis dirinta estis: Se iuj deziras bieron por la manĝo, ili mem aĉetu!

kaj trankvileco, kaj la kastelo estas rekomendinda al ĉiu esperantisto.

S-ino Nielsen regalis la partoprenantojn per impona kaj admirinda kaftablo, kaj ŝi rifuzis iun ajn pagon, sed deziris ke oni anstataŭe donu la koncernan sumon al Esperanto-Domo.

— — —

La 6-an de julio ni vizitis „La Malnovajn Ĉambrojn“ ĉe Avedøre, kaj tie s-ro B. Vemmer tre interese rakontis pri la historio de malnova trinkejo Strandholm, kies plej aĝa parto havas proks. 300 jarojn.

Por la mortinta Sigurd Harksen kaj lia edzino fariĝis porviva tasko plenigi la ĉambrojn kun raraj, malnovaj, historiaj objektoj kaj kuriozaĵoj. Ili nomis la trinkejon „De gamle Stuer“, kaj ili tiel famigis sian karakterizan kaj individuecan restoracion, ke ĉi tien venis homoj el ĉiuj partoj de la tuta mondo.

(el „Kontaktilo“)

Fredericia.

La du ekskursoj en junio parte fiaskis. Ŝajne en ambaŭ okazoj estis la vetero kiu kulpis.

Dum la unua al Munkebjerg la suno tiom brilis ke certe multaj preferis kuŝadon ĉe la marbordo, kaj dum la dua al Trelde Sande la pluvado minacis kvankam nur iom pluvetis dum la restado tie.

En la Munkebjerg'a ekskurso partoprenis nur 10 geklubanoj de ĉi tie, sed en la restoracio de Munkebjerg atendis nin niaj fidelaj geamikoj de Odense ges-roj Sørensen. Kune ni havis agrablan posttagmezon.

En la dua ekskurso partoprenis entute kun du gastoj ok personoj. Do nur malgranda societo, kiu tamen havis agrablan vesperon.

(el „Nia Ligilo“)

Silkeborg.

La Esperanto-klubo en Silkeborg aranĝas ĉiun jaron Esp-kursojn en la vesperlernejo, kaj la lastajn tri jarojn oni antaŭ la kursoj aranĝis propagandajn vesperojn kaj ekspozicion.

Ĉijare oni kreis la ekspozicion plejparte per materialo ricevita post anonco en „Heroldo“. En tiu maniero la esp.istoj en Silkeborg kolektis interesan ekspozicion kiu bone rakontis pri la multaj Esp.-gazetoj, pri amika kontakto inter popoloj per Esp.-korespondado, pri la helpo kian povas ricevi diversspecaj kolektantoj per Esperanto. Ekz. estis pli ol du cent alometetikadoj kaj multaj poŝtmarkoj, inter ili la novaj Esp.-poŝtmarkoj. La ekspozicio ankaŭ prezentis multajn esperantlingvajn turistbroŝurojn kaj Esp.-librojn. Antaŭajn ekspoziciojn oni kreis per helpo de la ekspozicio de Centra, sed laŭ la maniero ĉijara oni pruvis ke Esperanto taŭgas.

En la semajno antaŭ la ekspozicio pendis multaj Esp.-afiŝoj en la vendejfenestroj kaj en la fenestroj de la urbaj aŭtobusoj. La nova afiŝo tie pendis kiel veturanta afiŝkolono. Vere bona propagando. La gazetoj ankaŭ bone skribis pri la aranĝo, kaj kvankam la nombro de ĉeestantoj dum la propaganda vespero kun filmo kaj parolado (proks. 50) iomete seniluziigis, la aranĝo entute estis sukceso, ĉar cent homoj vizitis la ekspozicion posttagmeze, kaj kom-

KIUJN LIBROJN NI LEGU?

Jo van Hemert-Remmers:

SUR INSULO MALPROKSIMA

Eld. de Dansk Esp.-Forlag 1957. 79 paĝoj, kajerforma. Prezo: 5 kr.



Post „Dekkinga fuĝas“ jam denove eldonaĵo de DEF, sed malsimila al la antaŭa. La malproksima insulo estas Sumatro, kie la verkinto loĝis jam antaŭ la lasta mondmilito. Dum la japana okupado ĉiuj eŭropanoj estis malliberigataj, do ankaŭ ŝi, kaj

preneble la afiŝoj kaj gazetartikoloj bone rakontis ke Esperanto vivas kaj laboras.

Et Esperantokursus pr. brev

på 12 lektioner koster 15 kr. — Forlang en gratis prøvektion.

ESPERANTISTFORENINGENS KORRESPONDANCEKURSUS

v/ G. Rasmussen, Lindøvej 2, Bogense

la ŝoka konduto de la okupantoj estas temo de la libro. La temon oni devas malŝati, sed tiu kiu ne scias ke fajro povas bruli ne klopodas eviti ĝin. De tempo al tempo ne estas malutile ke oni donu al si mem lecionon pri la abomeneco de milito.

S-ino Remert-Hemmers rakontas lerte, kaj la ideo unue redoni resumon pri la geografio kaj historio de la malproksima insulo efikas bone, kvazaŭ reliefigante la postajn teruraĵojn.

Legu ĉi tiun libron ne kiel distraĵon sed kiel historian dokumenton. Ĝi kaj niaj esperoj pri daŭra mondpaco meritas tion.

O. N.

Johan Hammond Rosbach:

HOMOJ KAJ RIVEROJ

Originala novelaro eld. de KOKO, Randbølvej 4, Kbh. F., 1957. 140 paĝoj. Prezo: 12 kr.

„La vivo ne estas romano. La vivo estas noveloj, skizoj. Kelkaj el tiuj noveloj estas plenaj de sento, romantiko, belo. Aliaj estas tute sensignifaj kaj neatentindaj.“

Tiun aforismon enhavas unu el la noveloj de ĉi tiu libro. Preskaŭ paradokse ĝi estas la plej lasta; ĝi estus trafa antaŭvorto. Sed pro la elektita loko oni nun samtempe havas okazon kapjesi: „Vere tia estas la vivo“ kaj: „Ĝuste tia estis la novelaro“.

Sed kiuj el la noveloj estas plej atentindaj, tiuj plenaj de sento, romantiko, belo, aŭ tiuj ŝajne sensignifaj kaj — neatentindaj?

„La ligna ĉevalo“, pri malnova ludilo, estas el la lasta tipo, sed ĉarmega. „La junulino, la ĉapelo kaj mi“ pri sentoj kaj romantiko en la mondo de infanoj estas juvelo en la Esp.-literaturo (cetere unua-premiita de UEA).

Oni povus nomi ĉiujn el la dudek noveloj; ĉiuj meritas nomiĝon. — Kiu plej multe impresas? — „Bravulino“ pri bestialaĵoj

en germana koncentrejo? — „La japana tetasaro“ kun abrupta fino lasanta al la leganto pluan fantaziadon?

Sufiĉe ke la verkinto prezentis aron da altvaloraj legaĵoj al ĉiuj kiuj per bonŝanco ekkonis Esperanton.

La lingvo de la libro estas eminenta, la aspekto bela.

„Koko“ havos sukceson per ĉi tiu dua novelkolekto de Rosbach. O. N.

Prof. Svetilav S. Petroviĉ:

SONETKRONO POR LA ESPERANTISTARO

okaze de la 70-jara jubileo de Esperanto, julio 1957. — Eld. Serbia Esp. Ligo, Terazije 42, Beograd.

Sonetkrono estas ege malfacila formo poezia. Ĝi konsistas el 14 sonetoj 14-liniaj, kies 14 komenc-linioj formas la 15-an soneton. Ankaŭ la rimado estas malfacila, kaj se oni aldonas, ke en ĉiu soneto la 14 komencliteroj de la linioj formu frazon aŭ devizon — ekz.: Ivo Lapenna agis — oni komprenas, ke tiom da konsideroj kunludas, ke la enhavo povas memori pri la konata „Dehaku kalkanon, fortondu piedfingron!“ — Tamen la rezultato estas impresiga — kaj estus pli, se la rimoj ĉie estus bonaj, kaj la ritmo pli melodia. — Kaj tiu poezia bilanco de la Esp-movado absolute meritas atenton.

H. E. J

SENEHAVA PAKAĴO!

En la referato post la jarkunveno estis cititaj miaj eldiroj en diskuto tiel: „H.E.J. ne volis nei la utilecon de propagando, sed trovis, ke esperantismo estas kvazaŭ paketo, kiu kuŝas en la strato kun alloga surskribo tentanta por malfermo.“

Tuj post la legado mi intencis protesti, sed — pro mia dum la jaroj akirita inerteo — lasis. Referato ja estas mallonga kaj tial ne povas kunpreni ĉiujn nuancojn. Oni ja ankaŭ ne rimarkos mian kritikon — aŭ espereble forgesos!

Sed nun mi vidas en la lasta numero (9), ke mia esprimo daŭre fantomas, kaj tial mi deziras komenti la referaton, kvankam mi opinias, ke la esprimo vere estas



E. Windeballe

Dum la festeno s-ro A havis kiel ĉetablan najbarinon s-inon B., kaj pro tio neniu alia sinjoro enviis lin.

Kiam antaŭ ilin oni metis la manĝotan anseron, s-ro A rimarkis: Estas bone havi apud si la anseron.

Sed tuj komprenante la senpripensecon de tiu diraĵo, kaj volante savi la situacion, li rapide aldonis: Kompreneble pri la rostita ansero mi pensis . . .

„trovita orgrajno“ kaj povas esti utila instigilo.

Mi ne diris, ke *esperantismo* estas . . . ktp., sed mi avertis pri aranĝoj, kiuj multon promesas (i. a. la substreko de la facileco de Esperanto), sed malmulton plenumas, ekz. se oni startas kursojn, ne havante vere taŭgajn instruistojn, aŭ aranĝas klubvesperojn sen enhavo kaj valoro. En tiaj aferoj la malsukceso estas certa kaj vojo al malprogreso por la movado.

Sed cetere: Bonvolu atenti la averton en mia parabola esprimo — kaj agi laŭ ĝi!

Kaj fine mi volas danki la redaktoron pro liaj multaj aliaj orgrajnoj.

H. E. Jensen.

Deziras korespondi

Maljuneta fervojisto *Josef Skuhrovec*, *Horni Police 34, V. Ceska Lipy, Ĉeĥoslovakio*.

EADI

eldonis sian unuan bultenon, kiu estas sendita al ĉiuj membroj samtempe kun la svedmodela materialo por preparo de kursoj. La bulteno, kiu aperas en bonega redakto de H. H. Frey, enhavas raporton pri tio kion faris EADI dum la pasintaj du jaroj, artikolo pri la ses danaj lernejoj, en kiuj oni ĉisezone instruas pri Esp. kaj pri parolon de la instruista instrukcia kurso en Vejle dum la aŭtuna ferio. La kurso okazos en kunlaboro kun EADI.

Estas konstateble, ke nia cifero 100 neniel estas atingebla dum la nuna instruaro; la kampanjo komenciĝis tro malfrue; sed oni instigas plej forte al ĉiuj instruistoj, ke ili nun preparu kurson por la venonta jaro, tiel ke tiam realiĝos nia devizo:

Esperanto en 100 lernejoj

La 100 instruistoj-esperantistoj en nia lando povos progresigi Esperanton ĝis akcepto de la aŭtoritatuloj. Ĉi tiuj estas helpemaj. Ĉu ankaŭ la esperantistoj mem?

Rapida raporto

pri ĉefestrara kunveno 8/9

CDEL havas 968 klubmembrojn + 94 izolulojn = 1062 membrojn. El tiuj duobluoj: 29.

D-ro Mildwurf el Londono instruos en Ĉe-kursoj dum la venonta sezono en Herning, Silkeborg, Vejle kaj eble Odder.

S-ino Haudebine instruos en Korsør, Haslev kaj Næstved.

En la aŭtuno aperos noveldono de „Verden bliver mindre og mindre“. La formato fariĝos malpli granda, sed komence la papero estos pli bona. Krome oni klopodos (daŭrigo p. 116)

HEROLDO

DE ESPERANTO

Duonmonata internacia organo de
la Esperanto-movado

Prezoj en 1957

Abono tutjara kr. 20,00
Abono januaro-junio kr. 12,00
Abono julio-decembro .. kr. 9,50
Anonceto ĝis 25 vortoj .. kr. 3,00
Anonceto 26 ĝis 50 vortoj kr. 6,00
Anonco pokvadratcentimetre 0,60

Pri HEROLDO-libroj petu libro-
liston

Dana peranto



S-ino G. JAKOBSEN
Carit Etlarsvej 14,
Aabyhøj.
Poŝtkonto 54133.

FOTO

Aftryk

til meget fordelagtige priser. Således kun
26 øre for et 6 × 9. Ved 8 stk. og derover
af samme negativ kun 22 øre pr. stk.

Forlang prislister!

Mange års erfaring med forsendelsesfor-
retning. Garanti for omhyggelig udført ar-
bejde.

Nia Foto,
Bjerringbro st.
v/Henning Nielsen,

Telf. 357.
Giro 66122.

eldoni ĝin dukolare kaj — se eble — en
pli bona preso. Ĝi aperos kiel 8-paĝa kajero.

La planitaj prelegvojaĝoj de Ota Ginz,
Alexander Starke kaj Joŝiko Kaĵino ver-
ŝajne ne realiĝos. Ginz ne povas ricevi el-
irpermeson el Israel, Starke starigis tre
grandajn kondiĉojn por veni, kaj la japana
ĵurnalistino estas malaperinta sen postsig-
noj. Eble ŝi tamen aperos.

Oni esploras la eblecojn por eldoni Espe-
ranto-kurson per magnetofono.

La klubo en Oxbøl devis ĉesi.

Al interesuloj por

GERMANA AŬTOMOBILLO

aŭ motorciklo, nova aŭ uzita, mez-
klasa aŭ malgranda (ekz. BMW-
Isetta), mi volonte faros proponon
kun tre favoraj aĉetkondiĉoj. Bon-
volu skribi dane aŭ esperante al

Klaüs Schlüter,
Hamburg 23, Aŭenstr. 14.

Ni rekomendas al Esperantistoj

restadon en nia unuaklasa hotelo. —
Esperanto parolata.

HOTEL DANIA, Silkeborg. Tlf. 6 - 7 - 686.

☆ Esperanto-BOGTRYK

Indhent tilbud gratis og uden for-
bindende hos Sønderjyllands ældste
og største bogtrykkeri —

MODERSMAALET'S Trykkeri

Haderslev — Telefon 22031

A-S Modersmaalets Trykkeri - Haderslev